

ĈEA-retkomunikoj 3/2011

ĈEA-retkomunikoj estas neregula informilo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio sendata al ĉiuj rete atingeblaj membroj de ĈEA kaj ankaŭ al nemembroj, kiuj per ajna maniero montris intereson pri la Esperanto-movado en Ĉeĥio. Ĝi neniam enhavas aldonaĵojn. Se vi tamen ne volas ricevadi ĝin, sufiĉas respondi per simpla "ne sendadu" kaj ni tuj eligos vin de la dissendolisto.

1. SALUTVORTOJ KAJ ALVOKO DE LA NOVA REDAKTORO
2. ĈEA-KONGRESO MALANTAŬ LA PORDO!
3. VIKIMANIO SUBVENCIIA!
4. BIBLIOTEKO DE ESPERANTO-MUZEO EN SVITAVY ALIREBLIGITA
6. ĈEĤA ESPERANTO-JUNULARO AKTIVAS
7. ESPERANTO-KALENDARO

#### 1. SALUTVORTOJ KAJ ALVOKO DE LA NOVA REDAKTORO

Ĉi tio estas la unua numero de ĈEA-retkomunikoj, kiun preparas nova redaktoro, Miroslav Hruška. Nova redaktoro, kion tio signifas? De la sekva numero eblos legi la numeron ankaŭ en PDF (vi ĉiam trovos la ligilon al la PDF-versio en la komenco de la retkomunikoj). Mi ankaŭ atendas viajn proponojn kaj komentojn, ne timu skribi al mi iun ajn proponon, kion vi ŝatus trovi en la Retkomunikoj, kion vi ŝanĝus ktp. Kompreneble, mi kun ĝojo legos viajn kontribuojn kaj raportojn aŭ raportetojn. Adreso por kontribuoj: [miropiro2312@gmail.com](mailto:miropiro2312@gmail.com)

#### 2. ĈEA-KONGRESO MALANTAŬ LA PORDO!

Se vi ne jam aliĝis, ni invitas vin al ĈEA-Kongreso okazonta 7.-9.10. en Ŝumperk! Krom la labora kaj diskuta programo atendas vin tradicia dancvespero, trarigardo de la „malgranda Vieno“, projekciadoj el Universalaj Kongresoj, interesaĵoj pri Interreto, muzika programo k.a.

La aliĝilon vi povas elŝuti en <http://www.esperanto.cz/cs/akce/sjezd-ceskeho-esperantskeho-svazu-379.html>

Se vi forgesus numeron de via membrolegitimilo (por variebla simbolo por pago), bv. peti la informon ĉe [libusehyblova@seznam.cz](mailto:libusehyblova@seznam.cz)

Kaj por jamaj aliĝintoj - ĉar estos diskutata kaj aprokata nova statuto kaj elektata nova estraro por pluaj 3 jaroj (4 nunaj membroj nun foriras), gravas ankaŭ via ĝustatempa pretiĝo! Proponoj de la nova stauto, balotregularo kaj prezentiĝo de la novaj kandidatoj elŝuteblas samloke kiel la aliĝilo!

Ni esperas vian aktivan subtenon kaj antaŭĝojas vian partoprenon!

#### 3. VIKIMANIO SUBVENCIIA!

Unika internacia renkontiĝo omaĝe al dekjariĝo de Esperanto-Vikipedio okazos 26.-30.10.2011 en Svitavy. Persone ĉeestos ankaŭ fondinto de E-Vikipedio Chuck Smith kaj fondinto de la ĉeĥa Vikipedio Miroslav Malovec. Dank' al ĵus atribuitaj partaj subvencioj de la urbo kaj de la regiono prezoj povis esti malaltigitaj: programkotizo estis tute nuligita kaj por ĉiuj menditaj servoj (loĝado, manĝado, ekskurso) validas rabato 10%. La oferto validas por aliĝiloj kaj antaŭpagoj kiuj venos ĝis 15.10.

Aktualaj informoj troveblas en <http://vikimanio.esperanto.cz>

Por limigita kvanto de aktivaj ĈEA/ĈEJ-membroj oferteblas ankoraŭ plia subvencio el kroma fonto – informojn petu ĉe [evikimano@gmail.com](mailto:evikimano@gmail.com).

La programo temos ne nur pri Vikipedio kaj vikimediaj projektoj, sed ankaŭ pri ligo inter Esperanto kaj Interreto kaj komputiloj ĝenerale. La aranĝo taŭgas kaj por amatoroj kaj por spertuloj. Okazos ankaŭ vikipedia kurso por absolutaj komencantoj.

Vendrede 28.10. (ŝtata festo) ekde la 9-a horo okazos en la Domo de Ottendorfer Solena programo omaĝe al dekjariĝo de E-Vikipedio. Ankaŭ nepartoprenantoj de la tuta programoj estas invitataj! La programo estas ligita ankaŭ kun vizito de nia nova muzea ekspozicio „Spiritaj tradicioj de la mondo kaj Esperanto“.

#### 4. BIBLIOTEKO DE ESPERANTO-MUZEO EN SVITAVY ALIREBLIGITA

Omaĝe al la tria naskiĝtago de la muzeo, la librofonduso, ĝis nun sisteme kaj pacience katalogigata de s-ino Marie Čumová, estis oficiale alirebligita por publiko. Ĝis nun estis prilaboritaj pli ol 9 600 libroj kaj gazetjarkolektoj.

En la muzea paĝo estis verkita aparta rubriko pri la biblioteko <http://www.muzeum.esperanto.cz/eo/cxefa/biblioteko>, kie troveblas ankaŭ Katalogo de libroj kaj gazetoj

Ne preteratentu sur la paĝo troviĝantan Ligilaron pri gravaj Esperanto-bibliotekoj (realaj kaj virtualaj).

#### 5. AKTUALAĴOJ

Ni invitas vin al regulaj vizitoj al <http://www.esperanto.cz/eo/aktuality> kaj informas vin pri la novaj artikoloj el la lastaj semajnoj:

Esperanto-muzeo festas sian trian naskiĝtagon!

<http://www.esperanto.cz/eo/aktuality/esperanto-muzeo-festas-sian-trian-naski-tagon.html>

Detrua fajro ĉe Vinilkosmo

<http://www.esperanto.cz/eo/aktuality/detrua-fajro-e-vinilkosmo.html>

Operkantisto Miroslav Smyčka jubileas

<http://www.esperanto.cz/eo/aktuality/operkantisto-miroslav-smycka-jubileas.html>

Esperanto en hašekologia konferenco

<http://www.esperanto.cz/eo/aktuality/esperanto-en-hasekologia-konferenco.html>

ESPA 2 – platformo por konstruado de komercaj kontaktoj kun Hispanio

<http://www.esperanto.cz/eo/aktuality/espa-2-platformo-por-konstruado-de-komercaj-kontaktoj-kun-hispanio.html>

Antonín Dvořák en Esperanto

<http://www.esperanto.cz/eo/aktuality/antonin-dvorak-en-esperanto.html>

Vikirevuo MOZAIKO n-ro 12

<http://www.esperanto.cz/eo/aktuality/vikirevuo-mozaiko-n-ro-12.html>

Pluaj sonregistraĵoj el la projekto Karel Čapek

<http://www.esperanto.cz/eo/aktuality/pluaj-sonregistra-oj-el-la-projekto-karel-capek.html>

Por resti daŭre informataj pri la Esperanto-aranĝoj bv. sekvi <http://www.esperanto.cz/cs/akce>

## 6. ĈEĤA ESPERANTO-JUNULARO AKTIVAS (oficiala organo de ĈEJ redaktata de Marek Blahuš)

Ĉeĥa Esperanto-Junularo (ĈEJ) jam la sepan fojon spertas rekomenciĝon de la lerneja kaj akademiana jaroj kaj agadas kaj por varbi inter la novaj studentoj kaj por plifortigi sian aktivularon.

Ankoraŭ ferie fine de aŭgusto okazis IJS en Búbánatvölgy (Hungario) kiun ĉeestis tri ĉeĥoj. Programo Monitor de Ĉeĥa Radio Leonardo dufoje elsendis raportaĵon de Dan MRÁZEK el la IJK en Ukrainio (<http://tinyurl.com/leonardo-ijk11>). Sanktan meson kuncelebratan de Max KAŠPARŮ kaj lian sekvan aŭtografadon de libro dediĉita al esperantistoj la 15-an de aŭgusto ĉeestis en Brno Miroslav MALOVEC kaj Mirek HRUŠKA.

Praga klubo kunvenis komencaŭguste kaj poste sesope finaŭguste okaze de vizito de korea esperantistino YOONAE Han. La 1-an de septembro laŭ invito de Mirek HRUŠKA alvenis al Ĉeĥio juna rusino Arina OSIPOVA kaj ili renkontiĝis kun tri praganoj antaŭ ol iri al Partizánske (Slovakio). La 6-an de septembro gastis en Prago usona esperantisto Brandon SOWERS, antaŭe renkontita dum IJS, kun kiu kunvenis kvar klubanoj. Tuj poste la 7-an kaj 8-an ambaŭ gastoj kune vizitis Brnon, akompanataj de kvar lokaj ĈEJ-anoj. Plej laste la 24-an de septembro du ĉeĥaj kaj tri slovakaj junuloj akceptis en Brno briton Chris.

Laŭ iniciato de Mirek HRUŠKA retpaĝaro de la sudmoravia integrita trafiksystemo enhavas veturinstrukciojn en esperanto ([www.idsjmk.cz](http://www.idsjmk.cz)). Marek BLAHUŠ instruis esperanton en german-franca seminario en Villingen-Schwenningen (Germanio) kaj vizitis esperantistojn en Munkeno.

Antaŭvidata estas ĈEJ-renkontiĝo en Žirovnice komencnovembre. Por varbi novulojn, ĈEJ laŭ svisa kaj brita modeloj preparas por la vintro publikan konkurson en ellerno de esperanto kontraŭ premio. Pli da informoj venos. Retpaĝaro de ĈEJ troviĝas ĉe <http://cej.esperanto.cz/>

## 7. ESPERANTO-KALENDARO

2011-10-07/09: Kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio en Šumperk Info: [Tomecek@esperanto.cz](mailto:Tomecek@esperanto.cz), [www.esperanto.cz](http://www.esperanto.cz)

2011-10-10/16 Lingva seminario en la pensiono Espero en Skokovy. Ĝin organizas Asocio de Esperantistoj Handikapuloj, sed ĝi estas malfermita al ĉiuj esperantistoj (eĉ komencantoj) kiuj volas levi sian lingvan konon. Info: [drahotova@esperanto.cz](mailto:drahotova@esperanto.cz)

2011-10-15: Desegnado kun Pavel Rak (por infanoj) kaj Tra Japanio per Esperanto (kun Petro Chrdle) en Muzeo de Esperanto en Svitavy. Info: Libuše Dvořáková, [dvor.libuse@seznam.cz](mailto:dvor.libuse@seznam.cz)

2011-10-15: La 5-a Postferia renkontiĝo en Putim. Ekoturisma renkontiĝo kun lingvo-kleriga programo. Info: [pisek@esperanto.cz](mailto:pisek@esperanto.cz)

2011-10-26/30: VIKIMANIO - internacia renkontiĝo de kontribuantoj al Esperanta versio de Vikipedio en Svitavy. Info: [www.vikimanio.estranky.cz/](http://www.vikimanio.estranky.cz/) aŭ ĉe [evikimanio@gmail.com](mailto:evikimanio@gmail.com)

2011-12-10: AnkRo - Antaŭkristnaska renkontiĝo en Písek. Info: [pisek@esperanto.cz](mailto:pisek@esperanto.cz)

2012-07-10/15: La 18-a Internacia Medicinista Esperanto-Kongreso en Opava kun la ĉeftemo „Depresio kiel kromefiko de kronikaj malsanoj“. Info: [Eva.Kopecna@ivax-cz.com](mailto:Eva.Kopecna@ivax-cz.com)

2012-07-14/20: Internacia Esperanto-Konferenco de OSIEK en Svitavy. Tutsemajna aranĝo kun la temo „Sciencfikcia literaturo kaj robotoj“ kaj ĝia turisma antaŭprogramo en Prago 2012-07-08/14. Info: [www.kava-pech.cz/iek](http://www.kava-pech.cz/iek) aŭ [chrdle@kava-pech.cz](mailto:chrdle@kava-pech.cz)

2012-07-27-08/12: Flugkaravano al Vjetnamio lige al la 97-a Universala kongreso de Esperanto en Hanojo. Info: [www.kava-pech.cz/Vietnamio](http://www.kava-pech.cz/Vietnamio) aŭ [chrdle@kava-pech.cz](mailto:chrdle@kava-pech.cz)

2012-09-13-16: La 6-a kongreso de AEH-IKEH (handikapitaj esperantistoj) en ripozdomo Štíří důl u Krucemburku (Skorpia valo ĉe Krucenburk. Info: [aeh-ikeh@volny.cz](mailto:aeh-ikeh@volny.cz)

2012-09-27/30: Trilanda konferenco - Komuna konferenco de austraj, ĉeĥaj kaj slovakaj esperantistoj. Info: [www.esperanto.cz](http://www.esperanto.cz) aŭ [komitato@esperanto.cz](mailto:komitato@esperanto.cz)

2013-julio: Flugkaravano al Islando lige al la 98-a Universala Kongreso de Esperanto. Antaŭintereson neniukaze sindevigan bv. sendi al [chrdle@kava-pech.cz](mailto:chrdle@kava-pech.cz)

Ĉu vi ne trovis vian aranĝon ĉi tie? Ne kulpigu nin, sed sendu la informon pri ĝi al [miropiro2312@gmail.com](mailto:miropiro2312@gmail.com) (atentu la novan retadreson!). Ne eblas envicigi aranĝon, pri kiu ni ne scias.

Atentu, ke la plej kompletan kalendaron de Esperanto-eventoj en la tuta mondo, sed ankaŭ plurajn utilajn informojn, vi trovos ĉe [www.eventoj.hu](http://www.eventoj.hu)